

## **Aveno # 35 - (Ekologio - Ekonomio)**

jara kolekto 2010 ghis 2010-09-30 - (ordigita chefe laŭ la datoj) - kompleta prilaboro por la jarfina eldono  
Aktuale dissendita de: [ave@verduloj.org](mailto:ave@verduloj.org)

Saluton Manfred,

por aldoni bonan novaĵon el alia mondparto:

La sudafrika registaro finfine decidis ĉesi la financajn elspezojn en projekton sukcesigi novan tipon de atomenergia reaktoro:  
<http://www.mg.co.za/article/2010-09-17-sa-mothballs-pebble-bed-modular-reactor-project>

Temas pri teknologio kiun germanoj ne sukcesis (aŭ ne plu volis) fini, en la germana "Kugelhaufenreaktor". Sudafrikanoj aĉetis la rajtojn, kaj dum 15 jaroj promesis al nia registaro grandajn sukcesojn. La elspezita monsumo sufiĉus instali almenaŭ 500000 sun-akvovarmigiloj...

Kia honto! Sed finfine oni konstatas pri la stupideco!

Amike, Harro.

-----

Informo kaj ebleco **protesti kontraŭ nova giganta barlago en la Amazonia regiono** (Rio Xingu)  
<http://www.internationalrivers.org/node/5756>  
kaj pri la Rio Xingu  
<http://www.internationalrivers.org/en/xingu>  
(ankau en la portugala)

Aveno 2010-08-29

### **Tero-Politika Instituto, por daurigebla estonteco:**

Lester R. Brown, Plan B 4.0 (ankau en Esperanto je SAT libroservo)  
<http://www.earth-policy.org>

Organizajho por protekti la naturon - **reciklado** - edukado:  
(en) <http://www.earth911.com>

### **Botelakvo au kranakvo**

<http://www.youtube.com/user/EsperantoParolita>

### **Alia comikso pri enboteligita kranakvo:**

<http://www.filterforgood.com/blog/?p=3027>

---

### **2010-08-22: Tago de Tutmonda Trouzado por la jaro 2010**

Jen vi povas kalkuli vian "piedspuron" laŭ via vivkondicho.  
(elektu vian lingvon: de, en, es, ft, it)  
<http://www.footprintnetwork.org/en/index.php/GFN/>

Aveno 2010-08-09

### **Klimataj katastrofoj - sed ne nur:**

certe ne necesas priskribi la aktualajn katastrofajn klimatajn eventojn,  
se ni povas helpi ni faru tion - kutime per mondonaco al la help-organizoj.  
Sed mi shatus komenti mallonge - laŭ mia informo:

### **Pakistano - inundo:**

unu kauzo certe estas la plivarmigo de la oceanoj, kiu produktas pli da vaporo. La Himalajo pluvigas la nubojn.  
Do la homfarita kauzo estas la forceja efiko de niaj diversaj ellasgasoj (CO2, metano, N2O)

Pakstano forhakis la arbarojn.

Ruth Pfau, <http://www.DAHW.de> (germana (kristana) NRO por helpi kontraŭ lepro kaj tuberkulozo), laboras dum pli ol 20 jaroj en Pakistano. Shi diris ke ligno-mafio forhakigis la arbarojn. La radikoj de arboj tenas la grundon kaj retenas la akvon kiel spongon.

La mond-klimato kaŭzis la pluvegojn, sed la manko de la arbaroj kaŭzis la rapidajn kaj gigantajn inundojn.

Do, necesas unue helpi al la homoj, sed tuj poste rearbarigi la montarajn deklivojn. Unue tie, kie ili iam kreskis.

Certe estas multaj NRO-oj kiuj helpas en la tuta mondo - trovu tion kiu estas ... pli proksima al vi..

UN.., Rughja Kruco kaj Duonluno, Caritas, Diakonie, ...

### **Meza Europo - inundo**

same - pli da akvovaporo en la aero. Eble pli sagha politiko rilate la setligo, urbo-ampleksigo, lasado de naturaj inundo-areoj povus redukti la amlekson de la katastrofo. Krevighinta barlago akiris la situacion en la L-Niso-valo.

### **Rusio - varmego+sekeco+X= brulantaj regionoj**

Chefa kaŭzo estas la kontinenta klimato kun insulo da alta aerpremo, kiu preventas aliron de nuboj.

Sed homfaritaj estas minimume tri (mi ne scias, ĉu ankau estis homfaritaj incendioj):

1. en 2002 (?) Rusio (sub Putin) neniigis la regionan forst-mastrumadon. Kiam mi vizitis Siberion (Barnaul) en 2000 la homoj kolektis 2 (?) milionojn da subskriboj kontraŭ tiu plano. Putin tiel neniigis la respondecan sintenon de la homoj (fakuloj) rilate sia regiono - favore al la centrigo de ĉiu politiko. Vagonaroj da ligno-trunkoj estis eksportitaj al Ĉinio ktp.; sovaghaj bestoj chasitaj sen plano.

2. nun (sub)brulas multaj torfejoj, preskau ne estingendaj sen helpo de pluvo - gherale estas du tipoj da torfejoj:

tiuj kiuj estis sekigitaj por elpreni la torfon kaj por uzi la regionon por agrikulturo (homfarita brulejo), kaj alto-torfejo, kiu ne plu estas plenigita de akvo - kaj facile povas ekbruli.

Arbaroj kiuj havas multe da kushantaj sekaj branĉoj pli facile nutras brulegon.

3. Leghera ekagado de fajrobrigadoj, kiuj eble estas subevoluitaj. Eble ili atendis la ordonon el Moskvo ?

### **Sudameriko - malvarmo** - homoj kaj bestoj frostmortis:

klimata efiko - El Ninjo/La Ninja ? Ĉu iu scias pli

### **Arkto - varmo**

glacheroj (en Grenlando) kaj glaciigta marsurfaco pli rapide degelas. forcejdoma efiko.

### **Virtuala Akvo**

La germana popularscienca jhurnalo "natur+kosmos" informas pri la temo virtuala akvo - kiom da akvo oni bezonas por produkt kotonon, fragojn, viandon, benzinon, metalojn, uranion ktp.

Ni - en meza Europo ktp. - rabas akvon el regionoj kie ghi jam mankas - ekz-e el Uzbekio, kie chefe la kotono neniigis la sudan parton de la ARAL-mar.

Ili kalkulis, ke po germano 1,5 milionoj litroj da akvo estas konsumataj ĉiujare.

pli (de): <http://www.natur.de> - serchu "Wasser"

Per **bicikla mondvojagho** Alice kaj Cedric trovis multajn notindajhojn kaj fotis ilin.

Ili estas ordigitaj lau la vizititaj landoj. Multaj bildoj portas ilian komenton en la franca, kaj tiuj estas tradukataj de Ginette Martin en Esperanton (en form de komentoj) - elkoran dankon al shi.

Jam la sekvaj landoj havas la Esperanto-tradukon: Ĉinujo, Turkujo, Grekujo, Italujo, Tunizio.

Tre multaj bildoj estas vere pensigindaj.

<http://picasaweb.google.fr/portraitdeplanete>

Bonvolu alklaki Photos - kaj serchi la landon.

La **Ekologia NRO en Uzbekio** nun havas sidon en la parlamento - lau ordono de la prezidento.

La NRO elektis po unu personon en ĉiuj provincoj por reprezenti la ekologian movadon. Jen temo el unu el iliaj mesaghoj en la 3 lingvoj (en, ru, uz):

Raporto pri manifestacio je la limo al Taghikio kontraŭ poluado per fluorida acido (HF) fare de taghika shtata alumina fabriko "Tajik Aluminum Company (SUE Talko)", kiu kaŭzas naturmediajn, agikulturajn, kaj sano-problemojn en la najbareco (norda parto de la regiono Surkhandarya, Uzun, ...). (2010-07-17)

(en, uz, ru) <http://www.eco.uz>

Aveno - ekologio/ekonomio 2010-07-08

Je la 1-a de julio 2010, la parlamento de Finnlando, Eduskunta, aprobis la konstruadon de du pliaj **atom-reaktoroj en Finnlando**. La registraro ege urĝis la aferon, tial ke oni konstatis, ke eble post ferioj pli da deputitoj kontraŭus la planon.

Nun kvar reaktoroj funkcias en Finnlando: du en Loviisa (apartenas al kompanio Fortum) oriente de Helsinko kaj du en Olkiluoto (apartenas al kompanio TVO) sur la okcidenta marbordo. En Olkiluoto Areva-Siemens konstruas la kvinan ekde ĉirkaŭ 2002. La kvina eble estos preta ĉirkaŭ 2013-2014. La novajn reaktorojn oni konstruos en Olkiluoto (tiu de TVO) kaj en Simo aŭ Pyhäjoki (tiu de Fennovoima) sur la nordokcidenta marbordo. La novaj reaktoroj ekfunkcios iam en 2020-aj jaroj. Do tiam en Finnlando funkcios entute sep reaktoroj.

La unuan planon (tiun de TVO) poris 120 kontraŭ 72 deputitoj de 200 kaj la duan (de Fennovoima) 121 kontraŭ 71. En ambaŭ voĉdonoj du deputitoj donis malplenan voĉdonilon kaj kvin estis for. Nur Verduloj kaj Maldekstruloj ĉiuj kontraŭis. En aliaj partioj kelkaj poris kaj kelkaj kontraŭis, aŭ unu reaktoron aŭ ambaŭ. En partio Kokoomus, kiu estas en la registaro kaj kiu laŭ enketoj estos la plej granda en sekvaj elektoj en marto 2011, preskaŭ ĉiuj poris ambaŭ.

Greenpeace de Finnlando kaj aliaj verdulaj movadoj organizis manifestaciojn kontraŭ la novaj reaktoroj dum kelkaj tagoj. Oni ankaŭ gravuros nomojn de ĉiuj deputitoj kiuj poris la reaktoro(j)n en ŝtonego. Tiun ŝtonegon oni metos ie en videbla loko en centrala Helsinko post iom da tempo.

En Finnlando oni jam preskaŭ pretigis la unuan fazon de ega kaverna "Onkalo" kien kompanio Posiva ([www.posiva.fi](http://www.posiva.fi)) en estonteco metos ĉiujn radioaktivajn rubojn. La kaverna estas konstruata proksime al la reaktoroj en Olkiluoto en la finna, pli ol kvar miljarde da jaroj maljuna bazroko. La kompanio metos tien la rubojn de TVO kaj Fortum, sed ĝis nun kompanio Fennovoima ne interkonsentis kun Posiva pri ruboj de Fennovoima.  
De Tampere, Maku

**Finnaj verdpartiaj MEPOj** kontraŭagadas la atomenergian politikon de sia lando:

La du MEPOj, Heidi Hautala kaj Satu Hassi ekagas por bari ĝin kaj uzas la financan/impostan flankon de tiu afero. Satu ankaŭ skribis spritan komenton - <http://www.Satuhassi.net>  
[http://www.satuhassi.net/index.php?option=com\\_content&view=article&id=1702:in-finland-everything-is-so-well&catid=25:speeches-and-writings&Itemid=54](http://www.satuhassi.net/index.php?option=com_content&view=article&id=1702:in-finland-everything-is-so-well&catid=25:speeches-and-writings&Itemid=54)

Komento de Marko pri la rilato de la Verda Partio en Finnlando:

Jes, oni parolis pri tio jam antaŭ kelkaj jaroj. Estas mirinde, ke unu branĉo de industrio povas eviti impostojn tiel. Certe oni argumentis iam (kaj eĉ nun) ke tio estas necesa tial ke nia nacio povus konkuri kun aliaj ŝtatoj. En Finnlando precipe la arbarindustrio estas ege povhava. Mi dirus ke ĝi, EK (plej granda asocio de firmaoj) kaj SAK (unu el la laboristaj asocioj) estas la plej fortaj "vested interests" en Finnlando.

Kaj pri la Verda partio en Finnlando:

Nu jes. En 2002, kiam oni lastfoje permesis konstruadon de plia reaktoro, la verda partio ja forlasis la registaron. Ĉi-foje la partio diris ekde la voĉdonado, ke ili restos en registraro malgraŭ la ebla aprobo de pliaj reaktoroj. Ili ankaŭ promesis fari ĉion eblan por kontraŭstari la aprobon.

La verda partio diras, ke la verdaj ministroj ĉiam kontraŭis, voĉdonis kontraŭ kaj klopodis argumenti kontraŭ la aprobo. Tamen estas nur du ministroj de 20, do la verduloj ne havas tro multe da rekta povo. Longe antaŭ la voĉdonado en la parlamento aŭ eĉ en la registaro la verduloj, ankaŭ ministroj kaj deputitoj, videble partoprenis en manifestacioj kaj lekcionoj kontraŭ atomreaktoroj. Mi tute samopinias kun ili, kiam ili diras ke estas pli bone esti en la registaro kaj klopodi iom-post-iome ŝanĝi energi- kaj klimapolitikon ol forlasi ĝin kaj tute cedi de la eĉ malgranda povo tie. Post ĉio la verduloj faris ege bonajn aferojn en la registaro kaj povis gvidi la politikon en pli daŭripovan direkton.

AVENO 2010-06-06

Raporto pri la **pola & germana Anti-Atomenergia Tendaro** (2010-05-21/23) en Mescherin (Odro).

40 partoprenantoj partoprenis tendaron kontraŭ la planita atomcentralo je Gryfino (PL), sude de Szczecin. Inter ili ambau verdaj partioj kaj NRO-oj. Pere de prelegoj kaj la filmo "Uranium - ĉu tio estas lando?" donis informon pri la diversaj malbenitaj flankoj de la atom-vojo. Interkonatigho, vivo en la belega naturo laŭlonge de la Odro (antaŭ la inundo), kaj bona vegetara manghajho, subtenis la pozitivan senton de inter-lima kunlaboro.

Pollando, simile kiel Chehio malfaciligas la konstruadon de multaj vento-generatoroj malgrau la bona situo; sed pli facile estas plani kelkajn gigantajn atomcentralojn - ĉar la nuna karbo-centraloj ne havas longan estontecon. Ni esperas, ke la informo pri la realaj problemoj laŭlonge de la atom-vojo (ekspluatado, richigado, uzado de centralo, daŭraj radioaktivaj emisioj kaj kion finfine?) vekos pli da civitanoj en Pollando. La registaro jam rezignis pri la loko Gryfino, sed nun preferas la unuan konstrui je Zarnowiec, okcidente de Gdansk je la marbordo. Pli sub: <http://www.aflum.de>  
(lau persona raporto de Kaie Haas)

Planoj de **Pollando konstrui atomcentralon** je Gryfino, sude de Stetino, je la Odro

Jes, tiuj planoj ekzistas. La du unuaj en la pola historio atomcentraloj estu konstruitaj ĝis la 2020 (je la potenco 3000 MW). Tamen tiuj planoj estas ne nur malsagaj, sed ankaŭ malrealaj... Feliĉe. Sed la registaro enkondukas promociadon de la pozitivaj aspektoj de la atomenergio, ekz. en amaskomunikiloj.

Pli: (pl, en (parte)) <http://www.zieloni2004.pl/news.htm>

(Dankon al Pawel / Polaj Verduloj)

Jen informo de ministerio el germana Brandeburgo - okcidente de la Odro (2009):

<http://www.mugv.brandenburg.de/cms/detail.php/5lbm1.c.87269.de>

### **Chu novaj atomreaktoroj en Ukrainio ?**

Shajnas ke Ukrainio planas 6 novajn reaktorojn.

Ni (duona Eŭropo) ankoraŭ suferas je la radiado eksportita el Chernobil – kaj pagados por dus, tria .. sarkofago. Chu ili ne saghighas.

### **Ukrainio kun la granda areo povas produkti sufiĉe da biomaso, suna kaj ventoenergio.**

Tio donus multe pli da laborlokoj kaj kreus multajn novajn firmaojn. Krome investi en pli efika uzado de la energio. Farus la landon pli sekura. Per la sama mono – kion oni povas elspezi nur unufoje – kaj krome UA eĉ ne havas la monon, sed devas aĉeti kreditojn.

Vidu ankaŭ: "**100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio**" (eo, de EWS) sur <http://www.verduloj.org>

MESAĜO OKAZE DE **MONDA OCEANA TAGO** - 8 junio 2010 de UN - LA ĜENERALA SEKRETARIO  
Oceanoj ludas ŝlosilan rolon en niaj ĉiutagaj vivoj. Ili estas integra elemento en daŭrigebla evoluigo kaj grava fronto por esplorado. Dum sciencistoj esploras la oceanojn je ĉiam pli profundaj niveloj ol iam ajn antaŭe, ili daŭre eltrovas novajn formojn de mara vivo. Tiuj esploroj havas grandan potencialon por antaŭenigi homan bonfarton.

Sed, se ni deziras plene profiti el tio, kion oceanoj ofertas, ni devas alfronti la damaĝajn efikojn de homaj aktivecoj. La vivodiverseco de la oceanoj estas ĉiam pli streĉita. Troa ekspluatado de mare vivantaj rimedoj, klimata ŝanĝiĝo, kaj polucio pro danĝeraj materialoj kaj agadoj prezentas gravan minacon al la mara ĉirkaŭaĵo. Tion faras ankaŭ la kresko de krimaj agadoj, inkluzive de piratado, kiuj havas gravajn implicojn je la sendanĝereco de navigado kaj la sekureco de maristoj.

Multon oni jam faris en la kadro de la Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Juro de la Maro (1982) – nia "konstitucio por la oceanoj". Pli ol 15 jarojn post la ekvalidiĝo de la Konvencio, ĝi daŭre rolas kiel nia gvidilo. Sed se ni volas sekurigi la kapablon de la oceanoj servi la abundajn kaj variajn bezonojn de la socio, necesas fari multon pli. Okaze de tiu ĉi dua ĉiujara solenigo de Monda Oceana Tago, mi petas Registarojn kaj civitanojn ĉie, ke ili agnosku la grandegan valoron de la oceanoj de la mondo – kaj faru sian parton por garantii ilian sanon kaj ilian vivantecon.

[tradukis HT], Humphrey Tonkin, President Emeritus & University Professor of the Humanities, University of Hartford, CT 06117, USA

Aveno 2010-05-15

Sciencaj informoj pri **radioaktiveco kaj homo** : Otto Hug Instituto

<http://www.oh-strahlen.org/index.html>

Antaŭ iom da tempo mi alparolis vin pri la internacia peticio por malhelpi la dangxeran, malrespondecan kaj fi-profitcelan proponon de slovakia registaro sxangxi naturprotektadajn zonojn en la plej malnova kaj certe plej valora nacia naturparko en Slovakio -- Tatra Nacia Parko.

Finfine la kompleta Esperanta teksto de la peticio estas jam afiksita en la oficiala retejo:

<http://www.ekoforum.sk/peticia/stop-destruction-tatra-eo>

Se vi ne jam subskribis, bonvolu subskribi. En la kampeto "Organizo" vi povas indiki naturprotektan organizon kiun vi anas, aux vi povas indiki Esperantan organizon aux E-klubon (tio montros ke via subteno venas danke al la Esperanta versio;).

Bonvolu plusendi la informon ankaux al viaj lokaj E-organizoj kaj kluboj. La petskribo, krom la originala slovakaj kaj jam menciita Esperanto, legeblas ankaux en la angla, germana, hungara, franca, hispana kaj pola lingvoj.

La lukto daŭras, kaj jam kolektigxis pli ol 37 mil subskriboj. Ni klopodu aldoni al ili ankoraux kaj montri ke ankaux internacia publiko pli aprezas valorojn de konservata kaj protektata naturo ol miopan konstruadon kiu fakte signifas detruadon. Intertempe ankaux la Slovaka Akademio de Sciencoj kondamnis la preparatan zonplanon.

Dum la protesta tendumado neatendite forbrulis la domo de unu el la fruntaj aktivuloj de la protesto: en la domo dume neniu estis (cxar la aktivulo kun sia edzino estis partoprenantaj la proteston en Bratislavo), la hejtado estis elsxaltita kaj la domo ekbrulis sur la tegmento -- multaj cirkonstancoj aludas pri brul-atenco, sed ankoraux nenio estis pruvita.

Ni esperu, ke kun via helpo kaj helpo de internacia lingvo Esperanto ni sukcesos kunkrei internacian premon sur slovakian registaron kaj tiel malhelpi la senrespondecan detruadon; multaj el vi, mi scias, antaŭe vizitis Tatron; mi esperas, ke vi aux/kaj viaj infanoj kaj nepoj povos ankaux estonte viziti Tatron Nacian Parkon kaj gxui gxian naturan belegecon.

AVENO 35 (ekologio/ekonomio) 2010-04-25

2010-08-14/21 **Ekoturisma Seminario** – EKOTUR

Alvoko de Petro Chrdle, alighi al la chi-jara Ekotur, apud Ch. Budejovice. Bv. rigardi [www.kava-pech.cz/ekotur](http://www.kava-pech.cz/ekotur)

kaj pripensu vian partoprenon :-).

Se pluraj AVE-anoj partoprenus - ni povus aranghi publikan AVE-kunvenon - ligita kun la vizito en la naturo - en agrabla etoso kiel lastjare.

Unu el niaj informaj temoj estis foraj ghardenoj, dachoj – do, ghardenoj kiuj trovighas iom for de la domoj.

Jen retejo el Britio : <http://www.nsalg.org.uk/>

Sed pli amplekse: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Familiaj\\_%C4%9Dardenoj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Familiaj_%C4%9Dardenoj)

### **"Ni malhelpu detruiri la plej malnovan Slovakian Nacian Naturparkon Tatra"**

Mi petas subteni internacian peticion kontraŭ detruado de Tatra nacia parko en Slovakio...

<http://www.ekoforum.sk/peticia/stop-destruction-tatra-national-park/>

dankas kaj salutas, Juraj Procházka

GAZETARA ANONCO - Bratislavo 2010-04-22

Lesoochránárske zoskupenie VLK (Arbarprotektada grupiĝo LUPO), aktivaj civitanoj, leĝaj reprezentantoj de neregistaraj organizoj de la reto EKOFÓRUM kaj la fakula publikero invitas ĉiujn civitanojn, por kiuj Tatroj korigivas, ke ili aliĝu al la granda civitana protesto helpe al Tatroj kaj al la protektado de slovakiaj naciaj rezervejoj.

Ĝendaro okazis sur la Placo SNP en Bratislavo vendrede 2010-04-23 ek de la 16:00 horo.

Oni manifestas kontraŭ la proponata zonplano de TANAP, kiu signifus nuligon

de la senintervena reĝimo sur la areo 8800 hektaroj (88 km<sup>2</sup>) de la nacia parko, kaj kontraŭ la far la ministerio aprobita ekspluatado de ligno en la plej severaj naturrezervejoj.

La publiko kaj la fakuloj estas ŝokitaj de unuflankaj, fake senbazaj kaj profitcelaj decidoj de la Ministerio de Vivmedio de Slovaka respubliko, kiuj havus nerenverseblajn neniigajn konsekvencojn por la Tatra Nacia Parko (TANAP), kaj por [ĝiaj eroj] naturrezervejoj Tichá (Silenta) kaj Kôprová (Aneta) valoj kaj Zadná Poľana. La aroganteco, kun kiu estas ignorataj la fakularo, la publika opinio kaj la rimarkigoj de fakaj institucioj, trapasis la limon de tolerebleco.

Kelkdek juĝprocezaĵoj konfirmis malfakajn kaj kontraŭleĝajn procedadojn far respondecaj ŝtataj oficistoj koncerne mediprotektadon kaj protektadon de naturrezervejoj. Eĉ juĝverdiktoj ne kaŭzis endajn prorespondecajn konsekvencojn kontraŭ la estroj de la vivmedia ŝtatregita fako. La estraroj de la ŝtataj institucioj ne nur ne

allasas ajnan fakan kaj aferkoncernan diskuton pri sciencaj argumentoj kaj bazoj por tiaspecaj decidoj, sed eĉ kreas premon al siaj fakaj dungitoj, kaj konsekvence de tio ne nur fakaj argumentoj estas ignorataj kaj juraj proceduroj malrespektataj, sed finrezulte eĉ ekzisto de naturrezervejoj kaj naturpartoj en Slovakio estas serioze

minacata. Malebligi tion povas nur amasaj elmontraj de civitana rezisto.

"La naturo, arboj, birdoj kaj bestoj ne scias sin defendi. Sed ni scias tion, kaj tial ni helpos, kaj pere ni helpos ne nur al ni, sed ankaŭ al la sekvaj generacioj de homoj, kiuj volos vidi la naturon kaj Tatrojn en ilia natura kaj nedifektita beleco. Aprilo estas [tradicie] la monato de arbaroj. La 22-a de aprilo estas la Tago de la Tero. La 23an--24an de aprilo, je vendreda-sabata nokto, civitanoj, reprezentantoj de NROj kaj la fakularo ektendumos tre nekutime, nome sur placo meze de Bratislavo. La celo estas publike elmontri sian decigiĝon defendi slovakian naturon, Tatrojn kaj naciajn naturrezervejojn."

Juraj LUKÁČ, Arbarprotektada grupiĝo VLK

"La bildon pri evoluinteco de la lando kunkreas ankaŭ ĝia rilato al la kultura kaj natura heredaĵo, ĝia protektado, informado pri ĝi, ĝia disvastigado kaj kultivado. Tiu ĉi heredaĵo estas nia, komuna. Decidpova personaro de la nuntempa registaro per siaj decidoj, sintenoj, neagado aŭ silentado kondutas al nia natura heredaĵo sen eĉ ŝajno de respekto. Ni ne permesu ke Slovakio, do ankaŭ ni ĉiuj kiuj naturon ne transkalkuladas al mona profito, ekhavu la etiketon 'lando de barbaroj', kun sigelo de nemalfareblaj damaĝoj al la naturriĉaĵoj de nia lando. Niaj infanoj ne pardonos tion."

Daniel LEŠINSKÝ, Centro por daŭripovaj alternativoj, ano de la reto EKOFÓRUM

### **Grandiozaj manifestacioj kontraŭ Atomenergio en Germanio:**

Okaze de la 24-a jarigo de la atom-katastrofo de Chernobyl – kaj pro la tendenco en la germana politiko daŭrigi la atomenergian padon – malgrau la legho malhalti la reaktorojn lau ilia aĝo ghis 2022.

Pli ol 120.000 homoj partoprenis homan chenon inter la du atomcentraloj Kruemmel kaj Brunsbuettel (je la Elbo / Hamburgo) por protesti kontraŭ la plia uzado de atomenergio.

Samtempe pli ol 26.000 homoj manifestaciis en Ahaus & Gronau kaj Biblis: kontraŭ uraniaj fabrikoj tie, kiuj volas duobligi sian produktadon de uraniaj fuelostangoj; kaj ke la malrichigita urania heksafluorido estas

transportata ien en Siberion. En Biblis – kie mi renkontis 2 aliajn esperantistojn - trovighas du reaktoroj A+B; A devus esti malhaltita pro la aĝo. Krome Biblis trovighas proksime de la flughaveno Frankfurto, kaj ili ne estas sekuraj kontraŭ aviadil-kraŝo.

### La malpermeso aviadi estas beno por migrobirdoj, 19an de aprilo 2010

Unuafoje en la historio de la komerca aviado la birdoj disponas solaj pri la aerspaco dum sia migrado el la sudo al siaj kovejoj en la nordo. Precipe por migrobirdoj, kiuj flugas altege, malaperas grava danghero per la malpermeso aviadi: birdaj kolizioj. Chi-momente verŝajne centmiloj da migrobirdoj survojas al siaj kovejoj kaj iuj specioj povas atingi altojn de 9000 metroj. Birdoj atingas altolimon, kiam da malpliighinta kvanto da oksigeno en la aero kaj la malpli granda denseco de la aero malhelpas ilian normalan funkciadon. Por ius specioj tio okazas je tre granda alto; hindiaj anseroj (*Anser indicus*) estas viditaj super la pinto de Everesto. Plej multaj migrobirdoj tamen flugas je alto, kiu estas plej ekonomia por la vojaĝo, kiun ili tiumomente entreprenas. La plej difina faktoro estas la supermarnivela alto de la grundo sub la migrobirdo.

Alte flugantaj estas interalie la hindiaj anseroj, kiuj transflugas Himalajon je alto de 9000 metroj dum sia vojaĝo de centraziaj montaj lagoj al siaj vintraj teritorioj en la indusa valo en Hindujo. Aro da kantocignoj (*Cygnus cygnus*) survoje de Islando al okcidenta Europo estas observita de piloto je 8230-metra alto. Platbekanasoj (*Anas platyrhynchos*) atingis 6400 metrojn dum la migrado. Aro da vaneloj (*Vanellus vanellus*) ofte vojaĝas je moderaj altoj, sed estas observitaj je 3900 metroj, dum grizaj turdoj (*Turdus pilaris*) ja povas atingi 3300 metrojn. Malgrandaj cignoj (*Cygnus columbianus bewickii*) povas flugi je 2700 metroj super norda Ameriko, apusoj (*Apus apus*) - la plej flugtaugaj birdoj - atingas 2000 metrojn, neghanseroj (*Anser caerulescens*) estas viditaj je 1500 metroj kaj arĝentaj pluvioj (*Pluvialis squatarola*) nur 800 metrojn alte.

Radarobservoj ofte montras, ke migrantaj birdoj shanghas la flugalton por serĉi la plej taugan venton. Oni kredas, ke ili kapablas konstati, kiel la vento influas ilin mezurante la devion rilatan al la fora horizonto. La postrestajhoj de birdoj trafitaj de aviadiloj estas registrataj, certe kiam tiuj birdoj estas sufiche grandaj por endangherigi aviadilojn. Tamen proksimume 90% el chiuj birdaj kolizioj okazas dum ekflugo au alteriĝo. Ekflugantaj kaj revenantaj aviadiloj do ĉiam estas minaco por migraj birdoj.

[http://www.vogelbescherming.be/site/index.php?option=com\\_content&view=article&id=449:vliegverbod-is-zegen-voor-trekvogels&catid=14:persberichten&Itemid=105](http://www.vogelbescherming.be/site/index.php?option=com_content&view=article&id=449:vliegverbod-is-zegen-voor-trekvogels&catid=14:persberichten&Itemid=105)

Foto sur la retejo: Buteo kiel viktimo de kolizio kun F16

Fonto: "Vogelbescherming Vlaanderen" = Birdoprotektado Flandruja (tradukis Leo de Cooman, red-a de mw)

La bulteno **Monda Solidareco** estas alirebla per tiu kutima ligilo :

[www.globidar.org/solidareco/monda\\_solidareco.htm](http://www.globidar.org/solidareco/monda_solidareco.htm)

La bulteno estas ankaŭ havebla en pdf-formato per tiu ligilo :

<http://www.globidar.org/solidareco/ms101-eo.pdf> (664 ko)

Daniel Durand, Monda Solidareco kontraŭ la Malsato, [www.globidar.org](http://www.globidar.org)

AVENO 35 (ekologio/ekonomio) 2010-04-18

### Chasado de migrantaj birdoj en Malto !

Malto obstine plupekas, Vendredon, la 16an de aprilo, 2010

Malgraŭ la kondamno al EUa membroŝtato Malto fare de Eŭropa Justica Tribunalo je la 10a de septembro 2009 pro malrespekto de la Konsilia Instrukcio de la 2a de aprilo 1979 pri la konservado de la sovaĝa birdaro (79/409/EEG – Birdodirektivo), la malta registaro decidis remalfermi la ege kontestitan ĉason pri koturnoj kaj turtoj je la 24a de aprilo, 2010. Vogelbescherming Vlaanderen [Birdoprotekto Flandruja] koleregas!

[http://www.vogelbescherming.be/site/index.php?option=com\\_content&view=article&id=448:malta-volhardt-in-de-boosheid&catid=14:persberichten&Itemid=105](http://www.vogelbescherming.be/site/index.php?option=com_content&view=article&id=448:malta-volhardt-in-de-boosheid&catid=14:persberichten&Itemid=105)

### Kontraceptiva hormon-medikamento trovighs en fishoj. (Levonorgestrel)

Ghi ne estas malkombinita en klarig-instalajhoj kaj povas preventi la reproduktighon ankaŭ je fishoj.

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Arzneimittelrueckstaende+bedrohen+Fische,6,a15548.html>

(Universitato Umea, Svedio)

**Akvo-forto:** aparta akvo-kurenteto subtenas fishojn trovi la krom-vojon.

Krome ghi lasas pli da akvo por la generado da kurento.

<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Neue+Lockstrompumpe+hilft+Fischen+flussaufwaerts+unbesch>

adet+Wasserkraftwerke+zu+passieren,6,a15591.html  
(Esplorinstituto por akvo-konstruado: <http://cms.uni-kassel.de/>)

### **AVE je Azia Esperanto Kongreso en Ulan Bator, Mongolio:**

Se eblas, ni renkontighas kun lokaj/regionaj verduloj - s-ro ?? (respondeculo de la LKK) skribis ke li provus inviti membrojn de la Mongola Verda Partio.

Ni ankau diskutas pri regionaj aferoj (en Japanio pri la mortpuno - en Chinio pri Tibeto, Xinjiang, maltauga agrikulturo en Interna Mongolio).

Lau mia scio estas pluraj gravaj ekologiaj problemoj en Mongolio:

1. denove multaj brut-bestoj mortis pro la "dzuud" - seka frostego, kie mankas fojno...; sed krom la klimata "kulpo" multaj mongoloj bredas tro multajn bestojn - aparte la kaproj (shatataj pro la kajhmira lano) damaghas la herbejojn.
2. sovagha, malbone kontrolita ekspluatado (i.a. de oro - helpe de hidrargo ) venenigas la malmultajn riverojn, kaj nutras la korupcion, sed ne la naciajn ekonomion. Okazis protestoj de NRO-oj.
3. ekonomio estas malforta – mongola studentino 2004 rakontis ke ĉinoj trairas la limon por aĉeti la lanon rekte de la bredistoj - tiel la lano mankas al la laborlokoj por produkti lanajn vestaĵojn (kio zorgas por laboro).

### **Oleg prezentis pri la klimata shanghigho sur jutjub:**

La video estas nur 10-minutojn longa kaj tauxgas por plurfoja spektado cxe cxi-someraj E-arangxoj (ekz. UK, IJK) kaj por distribuo pere de Interreto sur esperantistaj pagxaroj kaj blogoj.

Eble vi povos trovi iujn membrojn de AVE, partoprenontajn UK kaj/aux IJK, kiuj povus organizi montradon de la prezento al la audienco?

<http://www.youtube.com/watch?v=LNep1dRmhiE>

kaj en ghi: <http://www.350.org>

### **Buchado de malgrandaj balenoj "Grind-baleno" je Faroer-Insuloj.**

Bestoprotektantoj protestis kontrau la mortbuchado de malgrandaj balenoj antaŭ la Faroer-insuloj, autonoma lando kiu iel apartenas al la dana reghlando. La dana ambasadejo diras ke tio estas farita nur por doni la nutrajhon al la loĝantoj tie:

<http://www.ambwien.um.dk/de/menu/Gr%C3%B6nland+und+die+F%C3%A4r%C3%B6er/Grindwalfang/>  
Kruela tamen, sed ĉiu mortigo de besto estas kruela.

Avenon 2010-02-19

La (nova) **germana ministro pri medio (CDU) opinias, ke oni bezonus atomenergion kiel ponto-teknologio.**

Sed ĉiu Euro pli en atomenergion mankos je la plikonstruo de la regajneblaj energioj.

Jen alvoko subskribi je BUND (Ligo por medio- kaj natur-protekto en Germanio); krom ĝenerala teksto de BUND vi povas kunmeti vian propran komenton: <http://www.bund.net/?id=4596>

Resumo de la "Ĝisdatigo de la lastaj **sciencaj rezultoj pri klimato**" (60 paĝoj) kaj komento (mw)

[http://mas-ao.org/article.php3?id\\_article=396](http://mas-ao.org/article.php3?id_article=396)

Jen la ligo al la originalo: <http://www.copenhagendiagnosis.org/>

### **Postuloj de la MSF'10 en Porto Alegre:**

1. Shanghi la kapitalismecan kreskado-logikon kaj trovi pli justan aliron al la komunaj valoroj (akvo, grundo, scio,..)
2. Ĝenerala Deklaracio de la Natur-Rajtoj (Rajtoj de la Patrino Tero) - estas celo por la sekv(j) MSF-oj. Evo Morales invitis al la sekva MSF en aprilo en Kochabambo pri la klimata shanghigho.  
(lau G. dilger, taz, 2010-02-01, p.9)

### **Oro per cianido venenigas:**

fine de Januaro 2000 rompighis la bardigo de la rubajh-lago de oro-ekspluatado Aurul je Baia Mare en Rumanio, kuzante venenigon per cianido kaj pezmetaloj la proksiman kamparon kaj la riverojn Sasar, Tisa kaj Danubo kuzante 1.200 tunojn da mortaj fishoj. Tiu cianid-metodo okazas en multaj lokoj kie estas malalta titro da oro en la erco. Fakte oni ne bezonas tiom da oro - ghi estas vivdanghera.

(lau Keno Verseck, taz, 2010-02-03, p.5)

"Chernobil en Amazonio"

Mi ĵhus subskribis la peticion - organizita de AVAAZ.org por postuli de la nafto-kompanio Chevron, repurigi kaj resanigi la **toksan rubo-heredajhon kiun Texaco**, filialo de Chevron, postlasis pro la **nafto-ekspluatado** en la Amazonia pluvbaro de Ekuadoro inter 1964 - 1990. Tiu poluado damaghis la naturon kaj la sanon de la tie vivantaj indigenoj. La konzerno nun lobias je Usona registaro ktp. por eviti gigantan

pun-pagon. Vidu la retejojn - la prezo de nafto devas enteni prizorgon, ke poluajho ne okazas.  
Peticio: [http://www.avaaz.org/en/chevron\\_toxic\\_legacy\\_1/98.php?CLICK\\_TF\\_TRACK](http://www.avaaz.org/en/chevron_toxic_legacy_1/98.php?CLICK_TF_TRACK)  
ChevronToxico, the website of Amazon Watch's Clean Up Ecuador Campaign, includes new video of affected Ecuadorians urging Chevron's CEO to clean up oil pollution: <http://chevrontoxico.com/>  
The Huffington Post, "Chevron and cultural genocide in Ecuador",  
[http://www.huffingtonpost.com/kerry-kennedy/chevron-and-cultural-geno\\_b\\_346257.html](http://www.huffingtonpost.com/kerry-kennedy/chevron-and-cultural-geno_b_346257.html)  
"CRUDE. The Real Price of Oil", Joe Berlinger's award-winning documentary film that chronicles the epic battle to hold oil giant Chevron accountable for its systematic contamination of the Ecuadorian - official website:  
<http://www.crudethemovie.com/>

Aveno 2010-01-31

Komento de AVE (mw) pri la lando de la chi-jara UK:

"Politiko de Kubo: mi esperas ke ighos iomete pli malferma rilate disidentoj. Mi ne kontrauas la socialismon, sed preferas merkato-ekonomion kun fortaj socialaj kaj ekologiaj framo-kondicho.

Respondo de Vilhelmo:

- Tio estas tutcerte la bona vojo por landoj kiel Germanio. Por latinamerikaj landoj - cetere tre diversaj en sia ekonomia kaj politika evoluo - tiu demando estas konstante diskutata, ekz-e en la ekonomiaj forumoj kiuj okazas chiu jare en Havano, kaj en la teoriaj tekstoj kiujn eldonas la kubanoj.

En la momento shajnas - por Kubo - regi la koncepto de Che Guevara, kiu proponis - surbaze de argumentoj ekz-e ke la merkato kreas kaj grandigas malegalecojn - kiom eble plej elimini la merkaton.

La tradicia opini-kontraueco estas unuflanke: ke socialismo eblas nur surbaze de alte evoluinta ekonomio, do nur kiel shtupo post fazo de kapitalismo kiu estas plene elcherpinta siajn eblecojn (tion shajnas provi la chinoj) kaj aliflanke: merkato ne nur ampleksigas la malegalecojn, certigas kapitalisman klason, sed ankaŭ burghan

pensmanieron, do oni evitu tion.

Kompreneble, la merkato trudighas, se necese, en sia "nigra" formo; sed ties efikon difinas la ceteraj cirkonstancoj.

Kubo iris kaj iras vojon absolute unikan: ili investis preskau chion en la sektoroj sano kaj edukado - ambau sektoroj kiuj absolute ne produktas plusvaloron en la merkata senco. Kaj iliaj kuracistoj kaj instruistoj laboras preskau chie en la tria mondo, donas siajn servojn - preskau chie kun kuba materialo - senpage al la malrichaj loĝantaroj, ekz-e jam de jaroj en Haitio. Ili ne estas merkate ekspluateblaj (char sano kaj edukado ne kreas plusvaloron).

Vilhelmo Lutermano aktivis che: "Le Monde diplomatique en Esperanto" <http://eo.monedediplo.com>  
kaj Monda Asembleo Socia (MAS) <http://mas-eo.org>

Agenda 21 en Freiburg/Breisgau <[freiburger-agenda21@freenet.de](mailto:freiburger-agenda21@freenet.de)>  
invitis al filmo pri la "4-a Revolucio" - **nome redukti la dependecon de energio-importoj**.  
Jen pagharo pri la filmo kaj la temo: (en,de) <http://www.energyautonomy.org>

Aveno 2010-01-12

**Rusio - Mono-urboj estas malstabilaj** - kelkaj malfondindaj:

En rusio ekzistas kiel heredajho de la sovetia ekonomio ch. 460 urboj kiuj estis kreitaj por unu au malmultaj industrioj. La nun ekonomia krizo tre minacas ilin, char unuflanke la entreprenoj devis zorgi ankaŭ por la socialaj servoj, sed aliflanke nuntempe multaj fabrikoj ne plu laboras profit-donaj, kaj la posedantoj preferas fermi ilin. Ekz-e la chefministro Putin devis savi la homojn de Pikajjowo, ordoninte de Deripaska la pluan funkciadon de la granda(j) fabriko(j). Jam du tiaj urboj estis malfonditaj; ch. 80 pliaj atendas la saman sorton, se "oni" ne sukcesas doni al ili pli grandan diversecon da laborlokoj.  
(lau AKP 1/2010, p.13)

Aveno 35 - 2009-01-08

Gratulon: **Litovio finfine malshaltis la malnovan atomcentralon en Ignalina**. tio signifas ke la lando devas importi kurenton, anstataŭ eksporti ghin. Sed ja estas alternativoj: vento kaj bio-energio.  
Se oni investas tiun sumon, kio estus necesa por konstrui novan atomcentralon oni povas krei similan kvanton da energio. Tamen estas iomete malpli simpla - sed multe pli sekura.

AVE k.a. intencas traduki la kolekton de "**100 bonaj argumentoj kontraŭ la atom-energio**" (en la germana) prezentita de EWS, alternativa energio-kooperativo en Schoenau/Nigra Arbaro.  
<http://100-gute-gruende.de/index.xhtmll> - Dank' al 6 kunlaborantoj rapide farita.

Akceptita resolucio de la Europaj Verduloj: **STOP BALTIC NPP / Balta Atom-Centralo !**

European Green Party, 11th COUNCIL MEETING Malmö, 16-18th October 2009

Eŭropaj Verduloj estas profunde afliktataj pri la projekto de Balta Atom-Centralo (en: Baltic NPP/ eo: BAC), intencita de "Rosatom", Russia' shtata atomaenergia kompanio en la regiono de Kaliningrad, apud la landlimo kun Litovio. Proponita reaktoro tipo VVER-1200 sur bazo de malnova Sovetia teknologio de la 1960aj jaroj, kaj sekve ne povas ŝajni sin moderna kaj kiom eble plej sekura. Ĉi tiu apartenas al reaktoro-generacio 2plus dum aliaj reaktoroj konstruataj en Eŭropo estas minimume de la generacio 3.

En la takso pri mediaj efikoj far Rusa atomindustrio, restas neklara kiu teknologio estos uzata por disponi/finstoki la radioaktivan rubon.

Alia koncernas la mankon de demokrata decidofarado. Laŭ rusaj Verduloj kaj ekologiaj grupoj, multaj oponantaj lokaj civitanoj ne ricevis la permeson partopreni oficialan publikan aŭskultadon (prezentadon); krome publika aliro al dokumentaro pri BAC estis komplika. "Rosatom" respondeculoj informis per malĝustaj faktoj rekte antaŭ de publika aŭskultado por influ la popolan opinion. Kaj nombro de amasoamaskomunikiloj kunlaboranta kun atoma industrio organizis masivan kalumnio-kampanjon kontraŭ ekologiistoj. Kvankam la konstruota BAC staros apud la landlimo kun la EU, "Rosatom" rifuzis la eblecon organizi internacian publikan aŭskultadon en najbaraj landoj. Sendependaj fakuloj ne estis permesitaj prezenti alternativan takson pri la projekto.

Eŭropaj Verduloj insistas ke la BAC-projekto efektivigo estos haltigata ĝis sendependa internacia takso estos farita, inkluzive de fakuloj de najbaraj landoj (Pollando, Litovio). Verduloj postulas novan publikon aŭskultadon, kiu estas justa kaj internacia, ne nur en la Kaliningrada regiono, sed ankaŭ en landoj kiu havas komunan landlimon kun tiu regiono.

2010-06-xx, Kopenhago, Invito al **Tutmonda kunveno pri En-urba Biciklado.**

Mi informigas en la novanumero de la tut-usona biciklista organizo (Bike League/Biciklo Ligo) ke granda renkontigxo de biciklo-amantoj (ne temis kutime pri konkursa biciklado sed pri praktika sur strata biciklado/urba-planado) okazos en Kopenhago cxi-jare en **junio 2010**. [Velo City Global .](http://www.bikeleague.org/)  
<http://www.bikeleague.org/>

Oni antaŭvidas mil partoprenantojn. La redaktoroj de la gazeto kutime sugestas ke Kopenhago estas "cxia" loko por biciklistoj, plej kopiinda inter grandaj urboj de la mondo. (Ankau' mi bone impresigxis). Eble lokanoj volas kunlabori **iel** kun BEMI kaj Verduloj informi pri Esperanto? Nur sugesto cxar mi mem versxajne estos okupata en Novjorko cxe UNO. Sincere, Neil

Jen la retejo de Biciklistoj Esperantistaj BEMI: <http://bemi.free.fr/eo.html> - certe ili partoprenas.

Mi esperas, ke tiam la **polico en Kopenhago** estos pli agraba kontraŭ la manifestaciantoj.

Dum la Klimata Pinto-Konferenco en decembro 2009 ili estis nekredeble mal-agrablaj.